



An organ of the Esperanto Association of Britain

Organo de Esperanto-Asocio de Britio

No. 31, October–December 2005 ★ N-ro 31, oktobro–decembro 2005

ISSN 1741-4679

**International Communication without Discrimination ★ Respect for All Cultures**  
**Internacia Komunikado sen Diskriminacio ★ Respekto por Ĉiuj Kulturoj**

## The World Esperanto Congress in Vilnius

*The World Esperanto Congress in Vilnius attracted 2 344 participants from every corner of the globe, with 43 from the UK. It was particularly pleasing to see people from many countries that are often not represented, like Kazakhstan and Vietnam. As extensive reports have already appeared in La Brita Esperantisto and Esperanto, here are just a few comments on a week packed with events of interest for everyone.*

**P**reskaŭ fariĝas kutimo doni epiteton al okazintaj Universalaj Kongresoj. Al la 90-a UK en Vilno oni alkrōcis la adjektivon 'belega' – kaj la vetero plejofte bonkonduitis.

### Vasta reklamado

La plej unua impresio venis jam en la alfluga aviadilo. La angla-lingva revuo de la litova flugkompanio enhavis bonvenigan artikolon pri la okazonta kongreso kaj Esperanto – bela reklamo. Due, preninte veturilon

el la flughaveno, oni vidis ĉe la stratoj flagojn kaj reklamstangojn kun afiŝoj pri la kongreso.

Kaj, kiam ni pagis, nia taksiŝoforo adiaŭis tute spontane per la vortoj 'Ĝis revido!' Evidente li lernis tion el la radio aŭ televido.

### Senpagaj turismaj gvidiloj

Ĉiu kongresano ricevis du belegajn, plenkolorajn turismajn gvidlibrojn. Por plimulto de la kongresanoj Litovio estis neniam antaŭe vizitata.

**Lithuania issues Esperanto postage stamp celebrating the first World Esperanto Congress in Vilnius**



The postage stamp with a value of 1 litu carries a portrait of L.L. Zamenhof and the emblem of the 90th World Congress in Esperanto and its translation into Lithuanian.



*Dum la inaŭguro. Maldekstre: Unu el la multegaj strat-afiŝoj laŭ la stratoj en la litovia ĉefurbo*

**Multe kaj populare**

La elekto de kunvenoj, prelegoj kaj simile estis ofte konsterne granda, tiel ke oni deziris partopreni en tri kunvenoj samtempe! Multaj aranĝoj estis tiel

popularaj, ke oni devis stari aŭ alporti pliajn seĝojn! Sed oni povas nur laŭdi la organizon de tiel multnombra kunveno – aparte kiam temas pri la bonaj rilatoj kun la aŭtoritatoj. □



*Alparolas partoprenantino el Kazahio dum kunveno pri Azia Agado. Sube: Polaj infanoj kantas Esperante ekster la kongreso.*

**Tutplanede**

**T**io en la nuna numero memorigis min pri vortoj de saĝa aktivulo de la dana movado, kiu multjare laboradis por serioze plialtigi la informitecon pri Esperanto. Mi demandis lian opinion pri agado en Britio. ‘Nenion vi povos atingi,’ li respondis. ‘La devo estas nia.’

Mi ne plene samopinias, krom se temas pri registara agado, simple ĉar Britio kaj Usono enspezegas pro la nuna maljusta internacia lingva kaj kultura ordo.

Ni memoru, ke eksterlandaj esperantistoj aprezas nian agadon, volonte montrante kun fiero, ke ‘eĉ britoj’ uzadas Esperanton.

Pli aĝaj membroj emas rigardi malaperon de lokaj grupoj kiel signon de malprogreso. Eventuale prave, sed la gusto de la homoj ŝanĝiĝas favore al uzo de la reto kaj al aliaj agadoj antaŭ dudek jaroj neekzistantaj. Ni prefere rigardu la movadon kiel internacian fenomenon. De Ĉilio ĝis Ĉinio, de Kazahio ĝis Burundio ni vidas agadon kaj entuziasmon. La movado ne dependas sole de agado en Much Binding-in-the-Marsh. Esperanto estas jam delonge afero tutplaneda.

Geoffrey Sutton

- Material for the **next issue of EAB Update** should be with the editor no later than 21 November.
- Materialo por la **venonta numero de EAB-Ĝisdate** atingu la redaktoron plej laste la 21-an de novembro.

*EAB-Update / Ĝisdate* is a quarterly organ of the **Esperanto Association of Britain** / estas kvaronjara organo de **Esperanto-Asocio de Britio, Esperanto House / Esperanto-Domo, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE.**

Tel. 0845 230 1887 or +44 (0)1782 372141

Fax / fakse: +44 (0)1782 372229

E-mail / rete: eab@esperanto-gb.org

Websites / ttt-paĝoj: www.esperanto-gb.org

www.esperantoeducation.com

□ Membership of EAB costs £25 a year (£20 concession); supporter/youth member £10 / Membrigi en EAB kostas £25 pundojn jare (£20 rabatite); subtenanto pagas £10.

☆

□ **Material for Update** should be sent by e-mail, computer disk or hard copy to the editor / **Materialon por Ĝisdate** oni sendu rete, diske aŭ papere al la redaktoro: Geoffrey Sutton, 7 Clover Road, Aylsham, Norwich NR11 6JW; e-mail / rete: gsutton@macunlimited.net. Material may be in Esperanto, English, Welsh or Gaelic / Materialo rajtas esti en la lingvoj internacia, angla, kimra aŭ gaela.

□ EAB also publishes the review *La Brita Esperantisto*, wholly in Esperanto, and the English-language internet bulletin *EAB NetNews* / EAB eldonas ankaŭ la revuon *La Brita Esperantisto*, tute en Esperanto, kaj interrete la anglalingvan bultenon *EAB NetNews*.

☆

□ EAB is a registered charity (No. 272676) and an affiliated national association of the **Universal Esperanto Association**, which has official relations with the United Nations and Unesco / EAB estas leĝe registrita bonfara asocio kaj aliĝinta landa asocio de **Universala Esperanto-Asocio (Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 Rotterdam, Nederlando. Tel. 00 31 10 436 1044; fax / fakse: 00 31 436 1751; e-mail / rete: uea@uea.org; www.uea.org)**, kiu havas oficialajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj kaj Unesko.

☆

□ EAB is also affiliated to the International League of Esperanto Teachers and the European Esperanto Union / EAB aliĝis ankaŭ al Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj Eŭropa Esperanto-Unio (EEU).

☆

□ The views expressed in *EAB Update* are not necessarily those of the Management Committee of EAB / La opinioj esprimitaj en *EAB-Ĝisdate* ne nepre estas tiuj de la Administra Komitato de EAB.

## Points from the July meeting

From 8 to 10 July EAB's Administrative Committee met in Barlaston for its committee meeting and annual discussion weekend. All trustees were present. Jill Ward, principal of Wedgwood Memorial College (WMC); Jim Voiels, EAB PR Officer; Terry Page, Congress Co-ordinator; and Angela Tellier, Education Co-ordinator, were also invited for parts of the meetings.

There follows a précis.

### Cuts in adult education

Jill Ward reported that there is a Government proposal to cease funding adult education unless it is specifically work-related, with nothing for open courses. This would be a major change to decades of help for this branch of education. The Committee expressed their wish to support the campaigns of the National Institute for Adult and Continuing Education (NIACE) and the Workers' Educational Association (WEA) to retain present levels of funding, lack of which could cause the closure of many adult education colleges, even WMC.

Jill also proposed looking into a way of saving EAB money on rates. This is being explored with Stoke City Council.

The council has abandoned the project to build a new local library near the EAB office, but the proposed college computer suite is going ahead. EAB will be involved where appropriate.

### Trustees' roles

Trustees will fulfil the following roles: *Vice-president*: Edmund Grimley Evans (8 for, Ian Fantom against); *Treasurer*: Joyce Bunting; *Secretary* and editor of *EAB Update*: Geoffrey Sutton (8 for, Ian Fantom against); *Publicity*: Helen Fantom; *Library Services*: David Bisset; *Publishing, and external relations*: Edmund Grimley Evans; *Education (external)*: David Kelso; *Research*: Ian Fantom; *Liaison Officer*, also with staff, and the

Language Watch project: Derek Tatton.

Also, Paul Gubbins was confirmed as editor of *La Brita Esperantisto* (8 for, Ian Fantom against), Geoffrey King as Honorary Librarian, Angela

work over the last 12 months.

The importance of trustees visiting local groups and federations was emphasised. Equally, groups might like to invite trustees from outside their area.

## British Esperanto Congress in Scarborough 28 April – 1 May 2006

• Information leaflets and application forms will be distributed with the January issue of *Update*. If you would like them sooner, contact Viv at Esperanto House (address on p.2) and ask to be put on the Congress mailing list.

Tellier as Education Co-ordinator, and Jim Voiels as Publicity Officer.

The Committee expressed its particular thanks to Viv O'Dunne, Angela Tellier, Terry Page and Jim Voiels for their

### Office and employees

As the Committee considers good relations with EAB staff are paramount, it was decided in future to invite all staff for a formal meeting, probably during the Barlaston discussion week-

### Campaign for adult education

A campaign has been launched by the National Institute for Adult and Continuing Education (NIACE) against recent cuts in funding for adult education – £55 million this year, with NIACE stating that 'the situation will be far, far worse in 2006–07'.

The cuts are impacting unevenly across the country but every community is affected in some way or other. For example, in Essex, the local authority faces a cut of 14%; City College Norwich will have £500,000 less to support adult classes; Milton Keynes Council funding for adult learning has been reduced by more than 18%; Darlington College has lost more than £600,000 for adult work.

These economic pressures on educational institutions do impact on our aims and work. For example, the 'Esperanto-tago' at Wedgwood Memorial College, which has run successfully for over ten years with an average of 17 participants, this year enrolled only one person. Why the dramatic drop? The reason is obvious – the fee for the day doubled this year. So, please support the campaign if you can.

Full details about the NIACE campaign 'Fairer Funding for Adult Learning' can be found through the NIACE website [www.niace.org.uk](http://www.niace.org.uk) or copies are available from NIACE, 20 Princess Road West, Leicester LE1 6TP. Tel. 0116 204 4200.

Adult education rarely hits the limelight but the service commands widespread respect and cross-party support. Few MPs will support these cuts and closures. The most effective way to protect and promote adult learning is to write to your MP expressing concern that the Government's commitment to 'lifelong learning' is being seriously compromised by these cuts.

Derek Tatton

end. Informal meetings already take place.

Efforts are being made to improve broadband service for the EAB office.

It was decided to distribute EAB's list of volunteers also as an electronic file.

### Liverpool University

A limited response to EAB's enquiries and offer of co-operation with the university's lecture-ship in Esperanto has finally been received. John Wells, as EAB president, is to write to the university authorities in an attempt to advance matters.

### Publicity

EAB will again have a stand at

the London Language Show at Olympia from 4 to 7 November. Helen reported that posters in various formats will be displayed on the internet as pdf documents for anyone to download.

Jim reported on progress in compiling the EAB Handbook. It was decided that it should be sent to Full Members only; an internet version is to be created.

Research into the possibilities of publicity during the 100th World Scout Jamboree in Essex in August 2007 is continuing. It is hoped that Junularo Esperantista Brita (JEB) will help.

### Education

Angela reported on work completed and presented her five-

Esperantistoj en  
malriĉaj kaj  
nepagipovaj landoj  
arde deziras  
partopreni en la  
internacia vivo per  
membrigo en UEA



Helpu ilin per mona  
kontribuo al **Fondaĵo**  
**Canuto de UEA**

year project which aims to introduce Esperanto into elementary schools. After this there was a discussion on Language Development in Schools. The project group includes Angela, Helen, and David Kelso. The whole received general approval and congratulations from trustees.

The Committee also decided that EAB will contribute for up to eleven teachers to attend a special seminar at the Summer Festival in Barlaston. It is clearly important that we always have a ready number of suitably trained teachers.

David Kelso underlined the need to develop our education policies, and it is intended to set up a funded working group to this purpose.

### British congresses

Terry reported on considerable difficulties in arranging a congress venue for the British Esperanto Congress in 2006. Since the meeting, however, a venue has been found at the Green Gables Hotel, Scarborough, from 28 April to 1 May.

It is still hoped to have the 2007 congress in Letchworth.

### New youth subscription rate

It was decided to introduce a Youth Subscription rate, which is equal to the Supporter rate.

### British Esperanto theatre

EAB will financially support Paul Gubbins' theatre group 'La Verda Ranaro' with £500 to take a production to the World Esperanto Congress in Florence next year. □

*Al la membroj de UEA, TEJO kaj ILEI  
Al ĉiuj esperantistoj*

## El 'Alvoko Rilate al la Laborplano de UEA'

Karaj esperantistoj,

... La sola novaĵo ĉi-jara estas 'malfermiĝo' en unu el la labor-direktoj. Tio signifas: 'Ne timu malfermi vin kaj vian asocion al la ekstera mondo por kunlabori kun ĝi.' Ni havas nenion por timi, ni havas nenion por honti, ni havas nenion por kaŝi. Male, la Esperanto-movado dum unu sangoplena jarcento kapablis travivi kaj ĝenerale resti pura en siaj idealoj kaj en siaj praktikaj agadoj. Ni ne mortigis kaj ne malriĉigis homojn. Trovu socion, kiu povas fieri pri la sama atingo.

Do, tute praktike ni ne restu kaŝitaj en nia angulo, sed fiere ni aliru la mondon (de niaj kolegoj, de la vilaĝestro ĝis Unuiĝintaj Nacioj) kaj ni proponu niajn ideojn kaj nian kunlaboron.

Nur tion diras la nova versio de la laborplano, kiun ni ĉiuj laŭlaboru, adaptante ĝin al nia loka situacio.

Cetere la nuna momento ŝajnas aparte taŭga por relanĉi la laboron por Esperanto, post sukcesa Universala Kongreso en Litovujo kaj reekresko de la membraro de UEA kaj TEJO, sukcesa instruagado de ILEI kaj sukcesegaj retkursoj de E@I, lernu.net, kaj diversaj aliaj projektoj, ekzemple www.esperanto.net. Mi apenaŭ povas mencii la sukcesajn projektojn nun plenumatajn. Ekzistas instruprojektoj retaj kiel NESTO kaj la kurso de la Argentina Instituto de Esperanto kaj pluraj naciaj, sed ekzistas ankaŭ pli ĝeneralaj projektoj sukcesaj kiel Interkulturo de ILEI, Lingvo de Paco de UEA, ktp. Pardonu nin la nemenciitoj! Ni devus simple imiti tiujn sukcesajn projektojn en niaj landoj kaj fakoj.

Amike

Renato Corsetti, Prezidanto de UEA

Heming Welde Thorbjørnsen, TEJO

Radojica Petrovic, ILEI

Osmo Buller, Ĝenerala Direktoro de UEA

• **Places still available**

## **Course-you-can - new 2-level programme**

A few places are still available on the beginners' Course-you-can programme (21–23 October) at Wedgwood Memorial College, Barlaston. This year Ionel Onet, who runs the book service in Rotterdam for *Universala Esperanto-Asocio*, and Angela Tellier, author of the successful *Urso-Kurso* and responsible for Esperanto education in Britain, are offering a two-level programme for absolute beginners and for post-beginners.

Both Angela and Ionel are expert Esperantists and experienced teachers. Ionel is no stranger to Barlaston, having been a popular guest lecturer at the 2004 summer festival. For this reason we are happy to welcome him back to Barlaston for Course-you-can.

The weekend, now in its third year, has proved a useful launchpad for learners taking their first steps in Esperanto. Several of the participants have gone on to study on higher level courses, such as the August summer festival, or to take one of the examinations offered by *Esperanto-Asocio de Britio*.

Further details are available either from EAB or from Wedgwood Memorial College (see p.2).

## ***Ni Festivalu!* - an opportunity also for local groups**

The *Ni Festivalu!* weekend is designed for Esperanto-speakers to do their own thing. It is open to groups and federations, for example to arrange their own programmes but to eat communally (and to relax afterwards in the pub) with members of other group, whose programme this year starts with readings of early

Esperanto plays and includes monologue writing, practical sessions and a lecture on an aspect of Esperanto drama.

It should be noted that the theatre strand of *Ni Festivalu!* is

not for beginners. Those who are learning the language and wish to practise it should either arrange with their local club to organise a separate programme during the weekend or come on one of the

## **Project Springboard**

Readers may have heard that our Government, in its inscrutable wisdom, has decided that foreign languages should no longer be compulsory in secondary schools. At the same time (so as to maximise the confusion, perhaps?) they have decreed that by 2010 all pupils at Key Stage 2 (ages 7–11) will be 'entitled' to tuition in at least one foreign language (including 'community' languages such as Urdu and Mandarin). They may have overlooked the fact that few primary schools actually have teachers qualified to teach foreign languages. The schools themselves, however, are all too aware of the problem, which is causing considerable head-scratching among headteachers and advisers.

Now, if primary schools 'must' teach at least one foreign language, and non-specialist teachers have to get up to speed in a language as quickly as possible, what better 'stepping-stone' to foreign languages than Esperanto? – simple, phonetic, regular, and easy to get your tongue round. With that in mind, Angela Tellier, our Education Co-ordinator, went to EAB's Administrative Committee in July with a proposal for 'Project Springboard': a package for primary schools, including teaching materials (based on *Urso-Kurso* and Elizabeth Stanley's pilot work in Gloucestershire), teachers' notes, visual aids, CD, mini-dictionary, *Mil Unuaj Vortoj*, in-service training for teachers and local (volunteer) support, which would allow primary schools to 'introduce' pupils to foreign languages through the relatively painless medium of Esperanto. The Committee were convinced and earmarked funds for the project. During the 'Somera Festivalo' Angela (with breathless support from Paul Gubbins and David Kelso) organised a one-day seminar for experienced and qualified Esperantist teachers to flesh out the idea and devise a development plan. Everyone was hugely enthused and agreed to work with Angela to have the pack ready in time for the Language Show in early November. Since then Angela has been making life very uncomfortable for her less energetic fellow team-members but preparations are moving forward swiftly and pretty well on schedule.

During September we shall be writing to all LEAs in England (Scotland and Wales have slightly different arrangements) and to potential pilot schools, outlining the project, inviting expressions of interest, offering demonstrations and further information, and enclosing invitations to the seminar which we shall be providing within the Language Show programme.

Watch this space !

David Kelso (Trustee responsible for education matters)

other Esperanto courses run at the college (for instance the 'Course-You-Can' event which takes place in October). Alternatively, if you are a beginner, you might care to attend the 'festival' weekend simply to listen to the language and familiarise yourself with its sounds.

• 20–22 January 2006 at Wedgwood Memorial College, Barlaston. Registration from 17.00 on the 20 January. Fees: Single Bedroom £75; Shared Bedroom £66; Non-Resident £50. 'Aliĝilo' available from the EAB office. Tel. 0845 230 1887 (address on page 2). □

*Atingis la redakcion pluraj kaj diversaj interesaĵoj el Afriko. Mi kredas, ke vi trovos ilin legindaj. Mi tamen aldonu, ke emuloj donacu plej sekure pere de la afrikaj fondaĵoj de UEA, sed helpi afrikajn esperantistojn ja ne temas sole pri mono. Ni lernis en Vilno, ke dum eŭropaj esperantistoj plendadas pri relativa manko de junularo, afrikaj esperantistoj plendas pri manko de maljunularo, kio laŭ afrikaj okuloj igas la movadon aspekti neserioza. Do, kial ne viziti kaj mem vidi? Post tio oni pli bone komprenos, al kio oni eventuale donacos.*

## Esperanto per somoso

Tintis mia poŝtelefono. Mi legis, ke estas mesaĝo. Mi devis malkovri la enhavon. Jen do franca teksto aperis. Mi rekonis la skribinton. Li estas benina esperantisto. Mi tuj respondis ne en la franca, sed en Esperanto. Plia mesaĝo lia venis tagojn poste, nun en Esperanto. Li forgesis akuzativon kaj aliloke misuzis ĝin. Mi respondis, korektante la teksteton. En aliaj tagoj devis atingi min 'somosoj' (SMSoj) interne de Togolando, kaj ankaŭ de ties ekstero. Pliafoje mi forigis skoriojn. Naskiĝis do en mi ideo pri uzo de tiu ĉi ilo por distavagi Esperanton.

Pasis tagoj, kaj aferoj strebis al maturiĝo. Pli ol dek somosoj ricevitaj el ekster Togolando plupensigis min. La kurso de TIETo/UTE en aŭgusto 2005 devigis min aliri somosojn. Mi skribis al kursano. Venis respondo ne en Esperanto sed en la franca. Mi tuj reagis, ke mi ne komprenas. Kelkajn minutojn poste aperis Esperanta teksteto kun misvortoj. Mi ne korektis, ĉar multon mi devus klarigi. Mi renkontis la skribinton kaj klarigis la aferojn al li parole. El liaj reagoj mi komprenas, ke manko de praktikado helpis lin

forgesi la malmulton, kiun li konas. Necesas ĉiam uzi la malmulton kaj plie kapti aliajn vortojn. Mia regula rilatado somoso kun li devigis lin uzi sian vortareton.

En mia lasta mesaĝo al li, mi uzis la vorton 'ronki'. Venis reago, ke li nenion komprenas. 'Serĉu kaj vi trovos' estis mia respondo. Kelkajn minutojn poste venis mesaĝo, per kiu li montris sian nekontenton: 'Mi neniam ronkas'. Mi ĝojas, ke li kaptis la signifon de la vorto. Mi komprenas, ke mi daŭrigu kun aliaj komencantoj, kaj mi ĵus trafis alian.

Sukceson en tiu ĉi vojado, sed ĉu facilas?

La vojo estas vere facila kaj rapida kaj netemporaba, sed ĝi konsumas, precipe kiam temas pri vokoj.

Tiom kostas la telefonkartoj, ke instruantoj kaj instruatoj malfacile uzos la vojon por voki, sed ja por somosi, ĉar ĝi estas tre praktika kaj simpla. Kion nun fari por kuraĝigi tiajn komencantojn?

Necesas, ke esperantistoj tra la mondo sendu somosojn al afrikanoj, precipe al komencantoj, kiuj tiel ekuzos la mal-

multajn vortojn, kiujn ili ĵus lernis.

Kolektado de telefonnumeroj ĵus komenciĝis. Ankaŭ eksterafrikanoj bonvolu disponigi siajn al la Afrika Oficejo de UEA.

### • FERIAJ KURSOJ EN INSTITUTO ZAMENHOF

En julio kaj aŭgusto gelernantoj kaj instruistoj lernis en Instituto Zamenhof. De la 25-a de julio ĝis la 26-a de aŭgusto 239 infanoj kaj junuloj lernis kadre de la feriaj kursoj. Al la gelernantoj oni disponis lecionojn pri la franca, angla, matematiko kaj fizikaj sciencoj. Sep instruistoj gvidis la kurson. Fine de la kurso okazis ekzameno, kiu ebligis disdoni premiojn al la plej bonaj gelernantoj.

Instruistoj de la instituto lernis kaj ekzameniĝis en Esperanto.

De la 22-a de aŭgusto ĝis la 1-a de septembro 2005 okazis kursoj por komencantoj. Al kvin institutaj laborantoj aldoniĝis sep aliaj homoj por lerni Esperanton laŭ la libro *Metodo 11* kaj la Zagreba Metodo. Ankaŭ iom da vortoj pri la historio de Esperanto en Togolando kaj cetere en la mondo oni disponigis al la gelernantoj.

La 2-an de septembro 2005 okazis la ekzameno A. Ok el dek kandidatoj sukcesis.

GBECLLO Koffi, B.P. 13169,  
Lomé, Togolando.  
Tel. (228) 227 51 64; (228) 271  
47 12; poŝtel. (228) 928 16 26;  
rete: esp.togo@cafe.tg;  
afrika.officejo@uea.org

## Kiom valoras 482 eŭroj?

Je la 23-a de junio 2004 donaco de 482 eŭroj atingis s-ron Mulele S. Mbassa, esperantisto en Bunda, Tanzanio. Tio estis la fina respondo al lia peto investi en kudrejo, por ke li komencu havi proprajn enspezojn. Tiu peto tuŝis la korojn de s-ro Saionji Masayuki kaj s-ro Eskill Svane. Tiuj bonkoraj esperantistoj en Japanujo kaj Francujo kune disponigis la monsumon. S-ro Svane tion faris kiel membro de Rotaria-klubo de Pézenas.

## AFRIKO

Fino de monkolektado, sed komenco de la laboro de Mulele S. Mbassa. Li tuj aĉetis kudromaŝinojn kaj aliajn bezonaĵojn kaj diligente komencis la realigon de sia revo. Plurfoje li sendis financajn raportojn pri la bona evoluo, kaj nun je la 15-a de julio 2005 li sendis du leterojn, kiuj meritas diskonigon. Mi koncizigis ilin.

Hans Bakker  
(kunordiganto de  
afrika agado de UEA)

Saluton!

Mi iam havis ideon fari artikolon kaj sendi ĝin al vi por Esperanto-revuo. La artikolo temas pri la mizero, kiu estas obstaklo al esperantistoj en evolulandoj trovi korespondamik(in)on en riĉaj landoj. Tiuj supozas, ke ili ricevos petojn doni monon. Mi pensas, ke tio endanĝerigas la Esperantomovadon en evolulandoj kaj konstruas klasojn inter la esperantistoj. Miaflanke mi tre dankas vin havigi al mi biciklon, kudromaŝinon kaj kapitalon por mia projekto.

Senhezite mi anoncas, ke la projekto estas jam profitdona. Nun en la sezono de la rikoltado de kotono, mi multe vendas vestaĵojn. La projekto bone progresas kaj havas bonan farton. Ne nur mi profitas sed ankaŭ la Esperanto-klubo kaj aliaj suferantoj. Mi jam helpis ok personojn por zorgi pri sia familio. Al unu el ili mi donis monon por aĉeti unu sakon da brasiko. Li diligente komercis per tio kaj li multe dankis min. Tamen ne mi meritas tiujn dankojn, sed vi, bonkoraj amikoj kiuj estis la bazo de tiu helpo.

Miaflanke la mono multe helpas min solvi miajn problemojn, faciligas la korespondadon kaj la kontribuadon al la komunumo ĉirkaŭ mi. Nun mi havas planon konstrui dometon por mia familio, ĉar ni ne havas dormejon en la dometo, kie mi nun loĝas. Fine mi tre bedaŭras la forpason de prof. d-ro Jan Knappert. Mi konis tiun sinjoron



La duonokulvitro  
being filmed. Below:  
The DVD cover.

## New award-winning interactive DVD from EAB

Imagine, EAB's first 'home-grown' DVD! It is suitable for computer or television and includes interactive exercises, transcript and an essay.

The 14-minute film features the monologue *La duonokulvitro*, performed by Colin Simmonds, filmed in the grounds of Wedgwood Memorial College, and accompanied by great music and subtitles! A brilliant educational resource.

*La duonokulvitro* is the first known piece written for the theatre in Esperanto. It is by French Algerian August Baissac, originally published in 1905.

**The DVD - marking 100 years of Esperanto theatre - won a prize at the *Belartaj Konkursoj de UEA* in 2005.**

The film may be watched with or without Esperanto subtitles. The text of the monologue is available by computer, there is an essay by Paul Gubbins on the drama, with exercises and solutions suitable for use at home, in the classroom, individually or in a group.

It really is excellent and hugely enjoyed by those who watch it.

Price: £7.00 (or £8.05 incl. p&p). **NB! Special offer:** *La duonokulvitro* DVD + *Verdaj voĉoj* CD for only £12 (or £13.80 incl. p&p) from EAB, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE. Tel. 0845 230 1887

EAB  
100  
DVD

La Duonokulvitro  
de Aŭgusto Baissac



Colin SIMMONDS prezentas la unuan publikigitan originalan dram(e)ton en la internacia lingvo. Ĝi tiu 14-minuta filmo premiigis en la belartaj konkursoj de UEA 2005.

La DVD-filmo videblas kun aŭ sen Esperanto-subtitoloj.

Per komputilo troveblas ankaŭ la teksto de la monologo, eseo de Paul Gubbins pri la drama, kaj ekzercoj kun solvoj, uzeblijaj ĉe hejme aŭ klasĉambre, individue aŭ grupe.

DVD  
VIDEO

La Duonokulvitro

per lia Esperanto-svahila vortaro, per kiu mi lernis la Esperanto-lingvon.

Plej amike,  
Mulele S.Mbassa

### Ĉu helpopetado riskas malbonigi la rilaton kun la petatoj?

Mizero estas difinebla kiel nehavado de esencaj bezonataĵoj, kiel nutraĵo, loĝejo, vestaĵoj. Estas multaj kialoj por mizero. Ĝi estas malsama de komunumo al komunumo en la mondo. En riĉaj landoj nehavantoj ne tiel suferas kiel tiuj de evolulandoj. Estas terure, ke en evolulandoj 89% de loĝantoj eĉ ne povas pagi sian sanservon. Aliaj ne por sufiĉa nutraĵo.

Multaj homoj en afrikaj landoj supozas, ke mizero estas manko de mono. Verdire ili tute eraras, ĉar iu povas havi multe da nutraĵo kaj bonan loĝejon, tamen ne monon. Ekzemple la loĝantaro de multaj vilaĝoj en Tanzanio posedas bovojn, kaprojn, ŝafojn, kokojn, tamen konsideras sin malriĉaj. Nehavantoj estas konsiderataj kiel frenezuloj en la komunumo. Ili estas mokataj de la havantoj, kiuj diras, ke ili estas nelaboremaj kaj ke tial mizero estas justa sekvo de ilia nelaboremo.

La efiko de la mizero estas mankego de esencaj servoj, kiuj fine igas viktimojn morti, precipe virinojn kaj infanojn. En evolulandoj la vivokosto ofte superas la enspezojn de la homoj, pro kio ili ne povas ŝpari por investi en io profitdona. Tiel iliaj problemoj restas nesolveblaj.

Havantoj konsideras la nehavantojn kiel senvaloraj. Ili ne havas la rajton vivi. Ili tute ne interesiĝas pri nehavantoj, konsideras ilin petemuloj.

Kiam nehavanto iniciatas projektojn tiuj estas ofte senfruktaj kaj mortas post nelonge pro la manko de sperto de la iniciatanto. Tiu ne povas esti sperta, ĉar li ne povis edukigi sin. Edukado estas tre multekosta.

Helpi al tia homo ne estas kulpo kaj ne helpi estas granda kulpo. Tia homo en si mem tute ne ŝatas esti tia, kia li/ŝi estas.

Tial li klopodas labori laŭ sia eblo, sed lia laboro ne donas al li pli da enspezoj por manĝi ĝustate kaj pagi edukadon.

Tia homo povas havi projekton en sia kapo, por kiu li havas bonan laborplanon, sed ĉiam ne povas plenumi ĝin pro manko de kapitalo. Ĉu li restu nehelpata? Ĉu li silentu pro la timo, ke petinte helpon de siaj geamikoj li riskas malbonigi la rilaton?

Ĉu estas eraro, ke personoj en riĉaj landoj donacu al siaj geamikoj jam uzitajn ilojn, ekzemple komputilon por ke la malriĉulo perlaboru monon, uzante la donacitan ilon?

Bedaŭrinde, kiam la mizeraj esperantistoj petas helpon de siaj korespondantoj, tiuj tute perdas emon plu korespondi kun ili kaj eknomas ilin monpetemuloj.

Mi ne povas nei, ke okazas monpetado. La afero eĉ por mi

estas teda kaj laciga, tamen la petito povas mem pensi, ĉu volonte li donacos aŭ ne donacos kaj poste plu korespondos, eĉ se li decidis ne donaci.

Ĉu oni ne vidas, ke se la senhava komunumo estos forgesita, pligrandiĝos diferenco de klaso inter havantoj kaj nehavantoj?

Tiu, kiu petas monon ne faras tion por havi luksaĵon, sed li vere havas esencan bezonon. La donaco de la havanto havas grandan valoron por la nehavanto, dum la donanto pro la donemo mankon kaj mizeron ne havos.

Ni havas monbezonon. Sed eĉ pli ni havas bezonon pri korespondada rilato.

Mulele S. Mbassa  
Volonte ricevas reagojn al la  
adreso: PO Box 25,

Bunda, Mara, Tanzanio.  
Rete: mulelembassa@yahoo.com

## MALLONGE

### • Margareta Handzlik MEP eĉe Jan Figel

La 5-an de julio la polan eŭro-parlamentaninon Margareta Handzlik (EPP-ED) akceptis en Strasburgo s-ro Jan Figel, ano de la Eŭropa Komisiono pri edukado, kulturo kaj multlingvismo. La renkontiĝo estis plene dediĉita al la problemoj de multlingvismo de EU. Jan Figel aŭskultis kun intereso proponojn de la pola membro de la Eŭropa Parlamento pri ebla uzo de Esperanto kiel propedeŭtika ilo por plifaciligi la studadon de fremdaj lingvoj. S-ro Figel serioze traktis la proponojn kaj petis de Margareta Handzlik plurajn informojn tiurilate. Oni interkonsentis pri pluaj laborkontaktoj.

### • Dana Esperanto-Asocio premiita pro elstara agado

Ĉe la Universala Kongreso en Vilno, UEA aljuĝis Premion Fayne al Dana Esperanto-Asocio pro ĝia lastatempa agado. Ĉiun duan jaron la Estraro de UEA

## IN SHORT

aljuĝas la premion al la plej sukcese aginta landa asocio.

### • Irano kaj Niĝerio aliĝis

Ankaŭ dum la Universala Kongreso en Vilno, UEA anoncis, ke ĝia komitato akceptis la aliĝojn de du novaj landaj asocioj. Ili estas tiuj el Irano kaj Niĝerio.

### • Nord-franca kontaktilo

Havra Esperantista Grupo, Francio, anoncis sian novan retan gvidilon eĉe [www.gvidilo.org](http://www.gvidilo.org). Oni diras: 'Ne hezitu komuniki viajn rimarkojn aŭ sugestojn.' Retadreso: [kontakto@tele2.fr](mailto:kontakto@tele2.fr).

### • Language Show on film

There is a film of the 2004 Language Show in London, at which EAB had a stand, at the website [www.thelanguageshow.co.uk/](http://www.thelanguageshow.co.uk/).

### • Google – brazilanoj serĉas tradukhelpon

Oni skribis, ke la ttt-ejo Orkut ([www.orkut.com](http://www.orkut.com)) estas populara,



unuavice nur en la angla, sed tuj tradukota en la portugalan. Google, la reta serĉilo kaj la posedanto, disponigas eblecon volontule traduki ĝiajn paĝojn en iun ajn lingvon. Do, oni petas anglalingvanojn helpi traduki la paĝaron Orkut, 'ĉar la tradukado estas nepre el la angla en Esperanton'. La adreso por iĝi volontulo estas <http://services.google.com/tc/Welcome.html>. Ju pli da tradukantoj, des pli rapida kaj des pli bona! (S-ro Felipe de Oliveira Queiroz, Florianópolis-SC, Brazilo.)

• **Bonvenon al Florenco 2006**  
Italaj esperantistoj bonvenigas vin al la 91-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Florenco de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2006. Jam funkcias la servo, kiu informas vin pri ĉio, kion vi volas scii pri la evento. Skribu al [uk2006.informoj@esperanto.it](mailto:uk2006.informoj@esperanto.it) aŭ vizitu [www.ukflorenco2006.it](http://www.ukflorenco2006.it).

• **Friendly fiction!**  
On 17 July there appeared a piece on Esperanto in the Staffordshire *Sunday Sentinel*. One comment on it was: 'Fact and fiction all mixed up. Can you believe anything? Never mind, at

• **4th Nitobe Seminar, Vilnius**

Immediately following the World Esperanto Congress in Vilnius, there began the 4th Nitobe Seminar within the Lithuanian Parliament building. It was attended by some 70 well-known linguists, scientists and politicians who had been invited by CED (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo) to discuss the linguistic, social and cultural aspects of the expansion of the European Union. Full reports appear in the October issue of UEA's magazine *Esperanto*.

The list of participants – from almost every country of the new EU – is impressive and shows what the serious Esperanto movement is capable of. (Translated from Prof. Humphrey Tonkin's lengthy summary:) 'CED did not aim just to fill the seminar with believers in the virtue of Esperanto, but to convince the participants that Esperanto is a realistic solution to the present linguistic inequality of the EU and that it and other proposed solutions deserve serious research. In this respect the seminar seems to have been a great success. The debate will continue, and further steps are already being considered in the form of internet contacts, publications, future conferences and practical interventions.'

least it's friendly'! See the website [www.thisisstaffordshire.co.uk](http://www.thisisstaffordshire.co.uk).

• **Language Watch**

Information on the 'Language Watch' project is available on the internet as a blog via [www.esperanto-gb.org](http://www.esperanto-gb.org) > information page > language watch. Comments welcome.

• **Mongol-ĉina ĝemeliĝo**

Laŭ iniciato de mongolaj esperantistoj, rektoroj de Mongola Instituto pri Sociaj Sciencoj kaj Ĉina Instituto pri Eksteraj Aferoj kaj Ekonomio konatiĝis, pridiskutis kaj fine subskribis kontrakton pri ĝemeliĝo, en tri lingvoj: la mongola, ĉina kaj en Esperanto.

• **Jubilei en Germanio?**

De la 2-a ĝis la 6-a de junio 2006 Germana Esperanto-Asocio festos sian 100-jaran jubileon kadre de la 83-a Germana Esperanto-Kongreso en Braunschweig. La 19an de majo 1906 oni en Brunsviko fondis la Germanlingvan Esperantistan Societon kun membroj el Germanio, Aŭstrio kaj Svislando. Kial ne profiti el vojaĝo tien ankaŭ por resti pli longe kaj viziti la aŭto-centron de Volkswagen en Wolfsburg (25km), ferii en la regiono Harz aŭ restadi kelkajn tagojn en la ĉefurbo Berlino? Okazos prelegoj kaj rakontoj de gravuloj de la germana movado: Detlev Blanke, Werner Bormann, Ulrich Lins, kaj Erich-Dieter Krause. Aligilon kaj pliajn informojn bonvolu peti de s-ro Christian Darbellay, Kaiserstr. 39 DE-24143 Kiel. Tel. 0431 73 77 88; rete: [Esperanto-Kiel@web.de](mailto:Esperanto-Kiel@web.de)

• **New! telephone buddy system**

We have set up a system of 'telephone buddies' to help those who would like to practise their conversational skills in Esperanto but who have little opportunity to do so regularly.

- Would you be willing to spend approximately 20 minutes a week helping beginner and intermediate Esperanto-speakers hone their conversational skills?
- Perhaps you feel you'd benefit from the experience of regular chats with a 'telephone buddy'?

If you would like to be either 'helper' or 'helped' or would like more information, please contact me.

You'll receive a set of 'guidelines' with suggested topics and suggested conversation structure and details of your 'buddy'.

Viv O'Dunne, EAB Office. Tel. 0845 230 1887

*NB. The applicant is responsible for making all telephone calls at the mutually agreed times and paying all telephone expenses. Telephone numbers and contact details of either applicant or 'buddy' may not be passed on to a third party without prior consent.*



### • Award-winning opportunity?

Thirteen outstanding language learning initiatives are to receive a European Award for Languages, marking them out as among the best in Europe. Over 30 languages are represented by the winning projects, which involve learners of all ages from

### • Skipton news

The following letter appeared on 5 August in the *Craven Herald*, a local weekly in Skipton, Yorkshire:

Dear Editor,

